WIKIPEDIA

Uzbeka lingvo

La **uzbeka lingvo** (uzbeke *O‘zbek tili* (latine), Ўзбек тили (cirile), ئۇزبېك تىلى (per araba alfabeto)) estas tjurka lingvo, nacia lingvo de uzbekoj. Ĝi estas parolata precipe en Uzbekio, Kirgizio, Kazaĥio, Afganio, Rusio, kelkaj aliaj landoj de Azio; ĝi estas 28-a en mondo laŭ parolantaro (pli ol 12,5 mln parolantoj). Ĝi estas sola tutŝtate oficiala lingvo de Uzbekio.

Pro diverseco de uzbekaj dialektoj la lingvon oni konsideras apartenanta samtempe al kelkaj branĉoj de tjurka lingvaro: al oguzaj lingvoj, al Karlukaj lingvoj, al Kipĉakaj lingvoj. Nuntempa literatura normo de uzbeka lingvo estas bazata sur dialektoj de Fergana valo. Al ĝia fonetiko, leksiko kaj gramatiko forte influis persa lingvo kaj per tio ankaŭ araba. Dum 20-a jarcento uzbeka lingvo trafis fortan influon de rusa lingvo. Grava eco de uzbeka lingvo estas neesto de vokala harmonio tre tipa por aliaj tjurkaj lingvoj; pro tio afiksoj en uzbeka morfologio havas nur unu varianton: ekzemple *-lar-* por la sufikso de pluralo (komparu kun paro *-lar-/-ler-* en turka lingvo).

Por uzbeka lingvo estas uzata latina skribsistemo akceptita en Uzbekio en 1990-aj jaroj anstataŭ estinta cirila; sed en multaj aliaj landoj kaj parte en Uzbekio oni ĝis nun uzas malnovan cirilan alfabeton.

Plej proksimaj lingvoj al uzbeka estas ujgura kaj formortanta ilitjurka.

Uzbeka lingvo	
O ‘zbek tili / Ўзбек тили / ئۇزبېك تىلى	
Parolata en	Uzbekio, Kirgizio, Afganio, Kazaĥio, Turkmenio, Taĝikio, Rusio kaj aliaj landoj
Parolantoj	27 000 000
Skribo	latina alfabeto, cirila alfabeto, araba alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Altaja (diskutata)	
Tjurkaj lingvoj	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Uzbekio[1]
	Afganio (loka)[2]
Reguligita de	Instituto de lingvo kaj literaturo je nomo de Aliŝer Navoi
Lingva statuso	1 sekura
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	uz
ISO 639-2	uz
ISO 639-3	uzb
SIL	UZB
Glottolog	uzbe1247
Angla nomo	Uzbek
Franca nomo	ouzbek
Vikipedio	

Enhavo

Geografio
Dialektoj
Historio
Alfabeto
Lingvoscienca priskribo
Ekzemploj
Uzbeka lingvo en Uzbekio
Uzbeka lingvo en Afganio
Uzbeka lingvo en Kazaĥio

Uzbeka lingvo en Rusio
Plivastigado kaj lingva politiko
Lernado
Uzbeklingva literaturo
Enciklopedioj
Uzbekaj verkistoj
Referencoj

Geografio

La uzbeka estas parolata plejparte en Uzbekio kaj najbaraj landoj de Meza Azio.

Landoj kun multe da uzbekparolantoj:

Lando	Parolantaro
Uzbekio	23,7 milionoj[3]
Afganio	2,9 milionoj
Taĝikio	1,0 milionoj[4]
Kirgizio	870 mil[5]
Kazaĥio	450 mil[5]
Turkmenio	320 mil
Rusio	270 mil[6]

Uzbeka lingvo estas oficiala lingvo en Uzbekio[1]. Ĝi ankaŭ havas oficialan statuson en kelkaj lokoj de Afganio[2]

Dialektoj

Historio

Alfabeto

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Uzbeka alfabeto.

Dum lasta jarcento alfabeto de uzbeka lingvo multfoje ŝanĝiĝis. Ĝis 1927 estis uzata araba skribsistemo, poste — alfabeta surbaze de latina, dum 1939 — 1992 estis uzata uzbeka alfabeto bazita sur cirila, ekde 1992 ĝin oficiale anstataŭigis latina skribsistemo[7], sed en ĉiutaga vivo la du skribsistemoj (cirila kaj latina) estas uzataj en amskomunikiloj, dum korespondado ktp. Parolantoj de uzbeka lingvo en Ĉinio kaj Afganio plu uzas araban skribsistemon.

Transliterumo					
Eksaj arabaj	**Eksaj latinaj**	**Eksaj cirilaj**	**Nunaj latinaj**	**Prononco laŭ esperanto**	**IFA**
-1929	1936-1940	1940-1992	**1992-**		
ا, ه	Ə ə	А а	**A a**	a	ɑ
ب	B в	Б б	**B b**	b	b
د	D d	Д д	**D d**	d	d
ه	E e	Е е	**E e**	e	ɛ
ف	F f	Ф ф	**F f**	f	f
گ	G g	Г г	**G g**	g	g'
ح,ه	H h	Ҳ ҳ	**H h**	h	h
ی	I i	И и	**I i**	i	ɪ
ج, ژ	Ç ç, Ƶ ƶ	Ж ж	**J j**	ĝ	ʤ
ك	K k	К к	**K k**	k	k'
ق	Q q	Қ қ	**Q q**	(ne)	q
ل	L l	Л л	**L l**	l	l
م	M m	М м	**M m**	m	m
ن	N n	Н н	**N n**	n	n
ا	A a	О о	**O o**	malfermi larĝe o	ɔ
پ	P p	П п	**P p**	p	p
ر	R r	Р р	**R r**	r	r
ص,س,ث	S s	С с	**S s**	s	s
ط,ت	T t	Т т	**T t**	t	t
و	U u	У у	**U u**	u	u
و	V v	В в	**V v**	v	v, w
خ	X x	Х х	**X x**	ĥ	x
ی	J j	Й й	**Y y**	j	j
ظ,ض,ز,ذ	Z z	З з	**Z z**	z	z
و	O o	Ў ў	**O ʻ o ʻ**	malfermi mallarĝe o	o
غ	Ƣ ƣ	Ғ ғ	**G ʻ g ʻ**	voĉa ĥ	ɣ
ش	Ş ş	Ш ш	**Sh sh**	ŝ	ʃ

چ	C c	Ч ч	**Ch ch**	ĉ	ʧ
ع ,ء	ʼ	Ъ ъ	ʼ	(ne)	ʔ

Lingvoscienca priskribo

Ekzemploj

Jen antaŭparolo de Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, unue en hodiaŭa latinliteraro kaj due laŭ uzbeka cirilo:

```
* Barcha odamlar erkin, qadr-qimmat va huquqlarda teng bo‘lib tug‘iladilar. Ular aql va vijdon
sohibidirlar
va bir-birlari ila birodarlarcha muomala qilishlari zarur.
* Барча одамлар эркин, қадр-қиммат ва ҳуқуқларда тенг бўлиб туғиладилар. Улар ақл ва виждон соҳибидирлар
ва бир-бирлари ила биродарларча муомала қилишлари зарур.
```

Uzbeka lingvo en Uzbekio

Uzbeka lingvo en Afganio

Uzbeka lingvo en Kazaĥio

Uzbeka lingvo en Rusio

Laŭ tutrusia popolnombrado de 2010 uzbekan lingvon en Rusio scias 273 451 loĝantoj (0,20 % de tuta respondintaro)[8]; laŭ aliaj taksoj - multoble pli[9].

Pro vasta labor-enmigrado el Uzbekio kaj aliaj landoj de Meza Azio uzbekoj estas unu el plej egaj naci-malplimultoj en Rusio kaj pro tio uzbeka lingvo estas populara en egaj rusiaj urboj kaj aglomeraĵoj.

Plivastigado kaj lingva politiko

Laŭ lingva politiko de Rusio lerniloj pri uzbeka lingvo (lernolibroj, vortaroj ktp.) estas malmultaj kaj en preskaŭ ĉiuj librovendejoj estas neaĉeteblaj.

En Rusio estas eldonataj kelkaj gazetoj parte en uzbeka lingvo celantaj informi uzbekajn enmigrantojn pri vivo en Rusio kaj rusia leĝaro:

- "Uzbegim" en Moskvo (retejo (http://www.uzbegim.info/))
- "Turan" en Sankt-Peterburgo (retejo (http://www.turangazeta.ru/))

Lernado

Uzbekan lingvon oni lernas en kelkaj celgrupoj en Moskva lingvistika universitato[10].

En 2014 en Moskvo dum kelkaj monatoj okazis senpaga kurso de uzbeka kaj 3 aliaj lingvoj (por rusparolantoj) kun instruisto el Moskva lingvoscienca universitato. Ĝin partoprenis kelkdekaj dekoj homoj; poste instruado daŭris por volantoj.

En Rusio estas eldonitaj kelkaj lernolibroj de uzbeka lingvo:

- "Учебник узбекского языка" (Мухитдинова Х.С., Насилов Д.М.). Moskvo, eldonejo "Восточная литература", jaro 2012
- "Узбекский язык для стран СНГ" (Бакиева Г.Х. kaj aliaj). Moskvo, eldonejo ФГБОУ ВПО МГЛУ, jaro 2012 (partoj 1 (http://www.linguanet.ru/collaboration/uis/ResursSNG-2012/uzbekSNG-2012-1R.pdf), 2 (http://www.linguanet.ru/collaboration/uis/ResursSNG-2012/uzbekSNG-2012-2R.pdf))
- "Узбекский язык. Самоучитель" (Арзамазов А.А). Moskvo, eldonejo "Живой язык", jaro 2015

Uzbeklingva literaturo

Enciklopedioj

- Uzbeka soveta enciklopedio
- Nacia enciklopedio de Uzbekio (uzbeke *O ʻzbekiston milliy ensiklopediyasi, O ʻzME* (latine); Ўзбекистон миллий энциклопедияси, ЎзМЭ (cirile); [Uzbekiston Millij Ensiklopedijasi]) estas universala enciklopedia eldonaĵo eldonita 12-volume dum 1997 — 2006.
  - Oficiala retejo (http://www.ensiklopediya.uz/) uzbeke
  - Paĝo kun ligiloj al ĉiuj volumoj (pdf) (http://n.ziyouz.com/kutubxona/barcha-kitoblar), ziyouz.com uzbeke
- Uzbeklingva Vikipedio

Uzbekaj verkistoj

- Gafur Gulom

Referencoj

1. ↑ 1,0 1,1 La sola tutŝtata oficiala lingvo (laŭ Konstitucio de Uzbekio, artikolo 4)
2. ↑ 2,0 2,1 Loka lingvo por afganiaj subŝtatoj en kiuj ĝin uzas pli multo da loĝantaro (laŭ Konstitucio de Afganio, artikolo 4)
3. ↑ Loĝantaro de Uzbekio en januaro 2013 — 29 993 500, el ili "uzbekoj" — 79,10 %. Informo pri uzado de lingvoj mankas. Laŭ informo de 2000 94% de uzbekoj nomis uzbekan lingvon sia denaska (Население Узбекистана. 2013. Taŝkento, 2013. — P. 3).
4. ↑ Etna konsisto, parolado de lingvoj kaj ŝtataneco de la taĝikia loĝantaro. Libro 3. Agentejo pri statistiko ĉe la Prezidanto de Taĝikio, 2012 (pdf). Paĝoj 12-16
5. ↑ 5,0 5,1 Laŭ popolnombrado de 2009
6. ↑ Laŭ popolnombrado de 2010
7. ↑ *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1994/04, paĝo 21: *Nova alfabeto* verkita de Ŝildo.

8. ↑ Loĝantaro de Rusio laŭ lingvoscio (http://www.gks.ru/free_doc/new_site/population/demo/per-itog/tab6.xls), rezultoj de tutrusia popolnombrado de 2010 (ruse)
9. ↑ Laŭ aserto de gvidanto de Federacia servo pri migrado (http://vku-org.ru/press/new/671-poyavyatsya-li-v-rossii-uzbekskie-derevni-glava-fms-rf-romodanovskiy-delitsya-planami.html), en Rusio estas pli ol 2 milionoj uzbekoj
10. ↑ Fako pri lingvistiko kaj profesia interkomunikado je politikaj sciencoj (http://www.linguanet.ru/departments/imospn/lingua-politics/), retpaĝo (ruse)

Lingvo

Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo

Listoj alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo

Diverslingve nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Uzbeka_lingvo&oldid=6449199"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 07:59, 2 nov. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.